

PASKO – 31 marto 2013

KIAL VI SERĈAS LA VIVANTON INTER LA MORTINTOJ? – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Evangelio laŭ Luko 24,1-12

Kaj la unuan tagon de la semajno, ĉe frua tagiĝo, ili venis al la tombo, alportante la aromaĵojn, kiujn ili preparis. Kaj ili trovis la ŝtonon derulita for de la tombo. Kaj enirinte, ili ne trovis la korpon de la Sinjoro Jesuo.

Kaj dum ili embarasiĝis pri tio, jen apud ili staris du viroj en brilaj vestoj; kaj dum ili timis kaj kliniĝis vizaĝaltere, tiuj demandis ilin: «Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj? Li ne estas ĉi tie, sed leviĝis; memoru, kiamaniere li parolis al vi, kiam li estis ankoraŭ en Galileo, dirante, ke la Filo de homo devas esti transdonita en la manojn de pekuloj kaj esti krucumita, kaj la trian tagon releviĝi». Kaj ili rememoris liajn vortojn; kaj reveninte de la tombo, ili rakontis ĉion tion al la dek unu kaj al ĉiuj ceteraj. Kaj ili estis Maria Magdalena, kaj Joana, kaj Maria, la patrino de Jakobo; kaj la ceteraj virinoj kun ili rakontis tion al la apostoloj. Kaj tiuj vortoj ŝajnis al ili kiel babilado, kaj ili ne kredis al la virinoj.

Sed Petro leviĝis kaj kuris al la tombo, kaj kliniĝinte, vidis la tolaĵojn solajn, kaj li foriris, mirante en si pri tio, kio okazis.

"Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj? Li ne estas ĉi tie, sed leviĝis". Tiu estas la paska anonco. Kaj tiu estas la bondeziro kiun ni faras kaj faras al ni mem dum tiu Paska tago. Sed ni vidu la pecon en kiu evangeliisto Luko rakontas la sperton de la releviĝo fare de la virinoj, kiuj tamen ne respektis la ordonon de la sabato antaŭ ol iri al la tombo.

La evangeliisto volas komprenigi ke la respekto de la leĝo malrapidigas aŭ malhelpas la sperton de la releviĝinta Kristo. Temas do pri tre severa

admono kiun la evangeliisto donas. Aŭ oni akceptas la novaĵon de Jesuo aŭ oni plurestas kondiĉitaj de la malnovo. Jesuo venis proponi novan interligon kaj ĉi-foje oni devas ĝin akcepti entute. Ne eblas meti la vinon de Jesuo en la malnovajn felsakojn de la antaŭa tradicio.

Nu, la virinoj iras al la tombo, trovas ke la ŝtono estis forlokita kaj prezentiĝas al ili du viroj. Tiuj du viroj estis jam prezentitaj en la epizodo de la transfiguriĝo kaj temas pri Moseo kaj Elija. Moseo la granda leĝodonanto kaj Elija la granda profeto.

Kaj ilia ĉeesto celas komprenigi ankoraŭfoje ke la Skribo, la tuta Skribo, devas esti interpretata ĉe la lumo de Jesuo. Estas ĝuste tiuj du viroj kiuj adresas riproĉon al la virinoj: *"Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj? Li ne estas ĉi tie, sed levigis"*. Estas tre grava instruo tiu kiun donas al ni la evangeliisto.

Kun Jesuo la morto ne interrompas la vivon, sed permesas al ĝi burĝoni en nova, plena kaj definitiva formo. La morto ne malproksimigas niajn karulojn de ni, sed ilin proksimigas. Tiu ilia ne estas foresto, sed ĉeesto. Do tiu anonco estas grava: la morto ne interrompas la vivon.

Ili poste daŭrigas memorigante al ili ke Jesuo jam parolis pri tio en Galileo, sed la evangeliisto modifas la frazon de Jesuo. Fakte ĉi tie la evangeliisto skribas: *"La Filo de homo devas esti transdonita en la manojn de pekuloj kaj esti krucumita, kaj la trian tagon releviĝi"*.

Sed en Galileo Jesuo ne parolis pri pekuloj, li parolis pri maljunuloj (la presbiteroj), pri ĉefpastroj kaj pri leĝinstruistoj, tio estas la membroj de la sindrio, la plej alta jura organo de Izraelo. Nun, post la morto de Jesuo, ili estas indikitaj kiel pekuloj. La pekuloj ne estas tiuj kiuj malrespektas la leĝon, tiuj kiuj ne sukcesas respekti ĉiujn regulojn de la leĝo, sed ili estas – kaj la denunco de la evangeliisto estas terura – ĝuste tiuj kiuj pretendas reprezenti Dion.

Tiuj kiuj sin prezentas aŭ pretendas esti la reprezentantoj de Dio, por la evangeliisto, reale estas pekuloj, ĉar ili antaŭenmetis propran intereson al alies intereso, propran avantaĝon al la alies avantaĝo, al alies bono. Pro tio ili murdis Jesuon, pro ilia avantaĝo.

Kaj la evangeliisto ilin likvidas per tiu esprimo "la pekuloj". Nu, la virinoj je ĉi tiuj vortoj memoras la anoncon de Jesuo kaj iras ili mem – eĉ se

tiuepoke konsiderataj la plej malproksimaj el Dio – iras anonci, plenumi la saman laboron, la saman agadon de la anĝeloj, tiuj kiu portas la anoncojn al la dekunu. La apostoloj estas evangelizitaj de la virinoj.

La rolo de la virino en la evangelio de Luko estas tre grava, estas la virinoj kiuj anoncas al la viroj ke la vivo estas pli forta ol la morto, sed la viroj ne kredas je tio. La evangeliisto denuncas masklecan kaj mizoginan mentalecon, kaj lia komento estas severa: *Kaj tiuj vortoj ŝajnis al ili kiel babilado, kaj ili ne kredis al la virinoj.*

La virinoj, pro la fakto ke Sara respondis al Dio per naiva mensogo, ne estis konsiderataj kredeblaj. Ilia atesto ne estis valida. Kaj la viroj, la dekunu, malgraŭ la instruo de Jesuo, malgraŭ ke Jesuo estis akceptinta inter sia sekvantaro virinojn, kiuj ĉi tie aperas kiel Maria de Magdala kaj Joana, estas ankoraŭ kondiĉitaj de tiu mentaleco.

Do, kiam la virinoj estas portantoj de anonco pri vivo kiu estas pli forta ol la morto, tiu anonco ne havas efikon, kondiĉita de la maskleca mentaleco, de la mizoginio de la maskla grupo kiu sekvas Jesuon.

Estas unu escepto. Petro, kiu ankaŭ estas parto de tiu grupo, ekmarŝas, ekmoviĝas al la tombo, sed vidas nur la malplenan tombon. Ĉe la tombo estas nenio por vidi. Nun estas nur vorto aŭskultenda, akceptenda kaj burĝonigenda en propra ekzisto.

Al ĉiuj bondezirojn por Bona Pasko!